# ESPERANTO EN BELGIO

REAPERAS...!

Jarkolekto 6 Oktobro 86

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Skotlandstrato 73
B-1060 BRUSELO

Poŝtĉekkonto 000-0163434-86 ! Tel. (02) 538 71 66

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Estimataj,

Ni kore invitas vin ĉeesti la ĉi-jaran jarkunvenon de B.E.F., kiu okazos sabate, la 8-an de novembro 1986 en la kunvensalono je la unua etaĝo de la kafejo " DE BEURS ", Mausstrato 5, 1000 Bruselo ( tel 512 62 06 ) . Tiu kunvenejo troviĝas dekstre de la Borso, kaj estas facile atingebla ekde la Centra Stacidomo tra la Granda Placo.

Jena tagorodo estas antaŭvidita :

9.30 - 11.30 : Estrarkunveno de B.E.F.
11.30- 12.30 : Kunveno de KLUBO 100.
12.30- 14.00 : Tagmanĝo surloke aŭ en la ĉirkaŭaĵo .
14.00- 17.00 : Jarkunveno de B.E.F.
Sekretariaj raportoj ( APE, FEL, BEF ).
Financa raporto kaj utiligo de la rentumo de la fondaĵoj
Raportoj de BEFA, ILEI, SONORILO, KLUBO 100, TURISMA KOMISIONO , ktp .
Diversaĵoj.
Elekto de nova estaro .

Proponojn pri punktoj pridiskutotaj ( ankaŭ far de neĉeestontoj ) bonvolu sendi antaŭe al iu estrarano .

Estu bonvenaj al la jarkunveno .

Nome de la estraro de BEF

## NI FUNEBRAS : FORPASIS ANDREE ORSOLINI

Komence de septembro neatendite trafis nin malĝoja novaĵo pri subita forpaso de fervora kaj multflanka aktivulino de la Esperanto-movado en Belgio, Andrée Orsolini. Ĝis la fino ŝi laboradis por la disvastigo de la internacia lingvo. Dum multaj jaroj Andrée Orsolini plenumis diversajn gravajn funkciojn je servo de la nacia kaj internacia movado, nome kiel ĉefdelegitino kaj perantino de U.E.A. por Belgio. Ŝi ŝi regule agadis en la sino de Belga Esperanto Federacio, kaj poste ankaŭ en la kadro de Asocio por Esperanto.
Krome unu el ŝiaj ĉefaj meritoj por nia informado estas la multjara redaktado de la ĉefa ligilo kaj informilo destinita al franclingvanoj, " l'Espéranto en Marche ". Malgraŭ diversaj financaj kaj organizaj problemoj, kaj spite al malboniĝinta sanstato, Andrée Orsolini sukcesis daŭrigi la aperigadon de tiu bulteno, kiu ludis rolon eĉ en Afriko.
Nia prezento ankoraŭ certe ne estas tute kompleta, se ni mencias, ke ŝi multe laboris por esperanto en la Karloreĝa regiono, kiel sekretariino kaj poste prezidantino de la loka grupo. Ni diru fine ke ŝia entuziasmo estis senlima kaj restos ekzempla por ni. Ni do adiaŭas kun bedaŭro kaj dankemo 66-jaran aktivulinon de nia movado dum la lastaj jardekoj .

Marc Demonty

## BEDAŬRINDA FORPASO : RENE NIZET

Apenaŭ dek tagojn post anonco de la forpaso de Andrée Orsolini, atingis nin same bedaŭrinda novaĵo pri forpaso je la 14-a de septembro de René Nizet, ŝlosila figuro por la informado pri esperanto en la regiono de HUY. Ni ŝuldas al li ne nur ekeston de nova kerno en tiu regiono, sed ankaŭ tre efikan informadon, i.a. ĉe altranguloj, kiuj povas influi la lingvoinstruadon en la unuiĝonta Eŭropo. Al liaj familianoj kaj amikoj ni esprimas nian sinceran kunsenton .

M.D.

ESPERANTO EN BELGIO reaperas !

Antaŭ unu jaro, EB ĉesis aperi 'pro materialaj kialoj'.
EB reaperas okaze de la jarkunveno de BEF, kiu decidos pri la estonteco...

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$



$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

La redakcio de BEF ricevis la kompletan liston de la donacoj kiujn FEL rikoltis ĝis la fino de 1985 por Klubo 100. Tiel ĝi povas nun aperigi la staton de la kontoj:

| | KLUBO 100<br>Listo rekte donacintoj )=1000 F | | KLUBO 100<br>Ald. listo rekte donacintoj (1000 F | | KLUBO 100<br>Listo donacintoj per konto FEL | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1984 | ROTSAERT Roland | 1000 | THIBE Jacques | 200 | LODDR | 1000 |
| | VERSTRAETEN Jules | 1000 | ESPERANTISTA BRUSELO GR | 581 | DE SMET Willy | 1000 |
| | BOVENDEERD Jan | 1000 | THILIS Jacques | 500 | LEIBOVITCH G. | 1000 |
| | DEMONTY Marc | 1000 | VAN DOOREN Frans | 250 | GERARD Raymond | 1000 |
| | DE WEERD S. | 1000 | DE HANTSELLES J. M. | 100 | DE ROOVER Rik en Paula | 1000 |
| | SYMOENS | 1000 | STAES Elly | 500 | DEBRUYNE Leon | 1000 |
| | DHONDT E. | 1000 | DE ROOVER Hendrik | 200 | DECLERCK C. | 1000 |
| | AUDENAERT Hubert | 1000 | | | D'HULSTER André | 1000 |
| | GRELA Willy (Mme) | 1000 | | | NAGELS | 1000 |
| | MERTENS GODSSENS André | 1000 | | | DE ROOVER Rik en Paula | 1000 |
| | DREZE L. | 1000 | | | LODDR Projad | 1000 |
| | LACROIX Blanche | 1000 | | | BORREMANS C. | 1000 |
| | MAERTENS G. | 1000 | | | VAN DOOREN Frans | 1000 |
| | JACQUES Jean Marie | 1000 | | | STEENHOUT Raimond | 1000 |
| | ESPERANTUJO | 1000 | | | SPITAELS Edward | 1000 |
| | GUYOT Mathieu | 1000 | | | LERNOUT Jozef | 1000 |
| | SIMON Ferdinand | 1000 | | | DE MARRE L. | 1000 |
| | THOLET Clément | 1000 | | | VERMEIREN Leopold | 1000 |
| | LECAT R. | 1020 | | | WILLEMS M. | 1000 |
| | BRISON Ghislain | 1000 | | | VAN BIERVLIET C. | 1000 |
| | DEPREZ René | 1000 | | | DE BROUWERE | 1000 |
| | ORSOLINI Andrée | 1000 | | | CLAESEN Albert | 1000 |
| | ERNST Elfriede | 1000 | | | VANDERHOYDONCK | 1000 |
| | BURNAY Robert | 1000 | | | | |
| | DE SUTTER Lucien | 1000 | | | | |
| | SLABBINCK Laura | 1000 | | | | |
| | TSIRIMOKOS Angelos | 2000 | | | | |
| | DEBROUWERE Gérard | 1000 | | | | |
| | JADOT Henriette | 1000 | Totalo | 2331 | | |
| | LIEGE ESPERANTO | 1000 | | | | |
| | WEEFS-VANSTEEN F. | 1000 | Jartot. rekte ricevitaj | 34351 | Jartot. donacoj al kont | 23000 |
| | Totalo | 32020 | Bankinterezoj ASLK-CGER | 1060 | | |
| | | | Imposto | -255 | | |
| | Totala saldo de la kontoj | 58145 | Saldo de la bankkonto | 35145 | Saldo al konto de FEL | 23000 |
| 1985 | DEMARCHE Raymond | 1000 | DE ROOVER H. | 200 | MAERTENS G. | 1000 |
| | LEROY Lucy | 1000 | | | SCHROEYERS Guido | 1000 |
| | VAN DAMME E. | 1000 | Totalo | 200 | | |
| | RIEM Arie | 1500 | | | | |
| | DE COENE Elvire | 1000 | Jartot. rekte ricevitaj | 5700 | Jartot. donacoj al kont | 2000 |
| | Totalo | 5500 | Bankinterezoj ASLK-CGER | 2247 | | |
| | | | Imposto | -562 | | |
| | Totala saldo de la kontoj | 67531 | Saldo de la bankkonto | 42531 | Saldo al konto de FEL | 25000 |

Klubo100 celkas la donacintojn! ĉi kun ricevis 2/3 de la celita sumo por la agado pri la Jubilea Jaro 1987.
$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

# J U B I L E A   J A R O

Aldona raporto al BEF-ĝenerala jarkunsido de sabato 23-a de novembro 1985

Raportas A. Staes.

1. La Baza Libro pri Esperanto, verkita de W. Auld, estas preta kaj havebla ĉe UEA.
   Temas pri tiu libro, priparolata en "Kiu faru kion ?" de UEA kaj destinita al tradukado nacilingven.

2. UNESKO-rezolucio.
   En tiu ĉi rezolucio, pri kiu cetere ankaŭ temas en ESPERANTO de UEA kaj kiu ĉefe pritraktas instruan programon,ankaŭ temas pri poŝtmarko. UNESKO nome konsilas al la Ŝtatoj Membroj i.a. ankaŭ eldoni poŝtmarkon pri Esperanto. Do, la temo, kiu antaŭe jam estis rifuzita de la Internacia Poŝtunio, denove estas malferma kaj aktuala.

3. Internacia Patrona komitato.

3.1. En Belgio decidiĝis antaŭ kelkaj jaroj antendi la novajn elektojn en 1985 por klopodi kunmeti el la nova ministraro Patronan Komitaton.por la Jubilea Jaro.

3.2. Interesa punkto estas, ke UEA aldonos libron pri la Patrona Komitato kun biografio de la membroj. Tio signifas ke ni ne nur petu de la celataj personoj konsenton pri partopreno, sed samtempe biografion. Kompreneble tio ĉi estas elemento prefere flata kaj do promesplena.

4. Kadrokursoj.
   AS prelegis pri (niaj) kadrokursoj en la UK en Augsburg. Li vendis tie 25-o da broŝuroj kun la kursotekstoj.
   Sekvis al tio interesiĝo flanke de vidersaj landoj.

5. Al la Broŝuro pri la Jubilea Jaro, kiu jam aperis, sekvos aldono antaŭ longe.

6. Grupa Agado.
   LA VERDA STELO invitis la urbestron de Antverpeno por prelegi en la klubo.
   Li akceptis kaj proponis daton en februaro 1986.

   Jen eble io interesa kaj sekvinda de aliaj grupoj kun sufiĉe granda kvanto da membroj.

---



Protokolo de la estrarkunveno de B.E.F., ok... 23/II/85 en Bruselo

Ĉeestas ( alfabete ) : J.Bovendeerd, L.De Bruyne, M.Delforge, M.Demonty, R.Deprez, L.Drèze, A.Mertens-Goossens, J.Verstraeten.
Senkulpiĝis : W.De Smet, E.D'Hondt, I.Durwael, A.Ongolini, E.Symoens .

I.Funkciado de BEF

I.I. Generalaĵoj
Jam de la komenco la kernestraranoj anoncas sian pretecon rezigni pri la respektivaj postenoj, se troviĝas laborpreta anstataŭonto. Sekve al alvoko de la invitilo al la jarkunveno, nur unu kandidato prezentiĝis: S-ro Rabosée. Ĉiuj konsentas por ke li transprenu funkcion de helpsekretario, kunlabore kun AMG, kun kiu okazu pli detala taskodisdivido.
Pli ĝenerale aperas ke restas diversaj vidpunktoj pri la ekzakta rolo de BEF : ligilo (JB), motoro(LD) aŭ kupolo . JB insistas pri tio, ke la liga rolo de BEF inter FEL kaj APE devus fortiĝi.

I.2. Financoj
Laŭ JV la kaso de BEF havas netolereblan deficiton. Malgraŭ antaŭvidebla malpliiĝo pro novaj lukondiĉoj, necesas enspezigi pli ol nun. Tio estus laŭ JV ĉefa tasko de eventuala nova kasisto. Post rekalkulo aperas ke la eldonkvanto de Eo en Marche restas tro alta por la buĝeto.

I.3. Komisiono pri Turismo
Ĝia starigo en la sino de BEF, kiel kupolo por tiaj komisionoj ĉe FEL kaj APE, estas prponita de LDB kaj akceptata de la estraro. Kandidatiĝis S-ino Caestecker, kiu estas unuanime akceptita.

2.KLUBO IOO
Ĉi-foje pro praktikaj kialoj la kunveno de la Jubilea Komisiono rekte ligiĝas kun la estarkunveno de BEF. La ĉeestantoj decidas pri jenaj punktoj :
- interkonsento pri transpreno de la preskostoj de kolokvaj tekstoj (Aalst) far Klubo IOO.
- enŝoviĝo de la kadrokursoj en la jubilea programo.
- relanĉo de la peto pri Eo-poŝtmarko en I987, surbaze de la Unesko-rezolucio.
- daŭrigo de la serĉado de patronoj por la patrona komitato.
- ebleco viziti lokajn grupojn por urbestroj ( sukceso en Antverpeno).
- Akcepto de subvenciado al translima informa agado ( peto de S-ro Lentzen ).
- Provizora rifuzo de subvenciado de ILEI-Belgio, konsiderante ke eblus unue peti subvencion de la ministerioj pri kulturo okaze de la I986-a konferenco Se ne realiĝus tio, pruntedono de monrimedoj eblus.

MD

Protokolo de la ĝenerala jarkunveno, okazinta samtage je la I4-a horo en Bruselo

Ĉeestas : kiel matene + Ges. De Schepper, L.De Sutter,E.D'hondt, S-ino Dupont, S-ino Ernst,S-ro Jacobs, S-ro Maertens, S-ro Rabosée.

I. MD malfermas la kunvenon, salutante la ceestantojn, kaj substrekante ke la jarkunveno okazas en la nova sidejo de BEF, ankaŭ dank'al kunlaboro de LDB. Sekvas la sekretariaj raportoj de BEF(AMG), APE(LD) kaj FEL(JB) legeblaj aliloke. GM intervenas por substreki, ke la aktivecoj de EEC povas aperi en laraporto de BEF, kaj reliefigas la elstaran rolon de S-ino Ernst, kio aplaŭdigas la ĉeestantojn. Ĝenerale li insistas pri tio, ke BEF ne estu tro modesta pri agadoj, kiuj tamen restas ligitaj kun ĝi.

3. JV prezentas la financan raporton, kiu estas aprobita, kun danko al la sindonema kasisto. Oni decidas pro la tikla financa situacio ĝiri la rentumon de la fondaĵoj al la ĝenerala kaso de BEF.

4. GM raportas pri la translokiĝo de la sidejo de BEF ( kaj EEC ) al Skotlandstr. kiu estis jam sidejo de Esperantotur-Benelukso, insistante pri financaj kaj ceteraj avantaĝoj. Restas tamen la projekto pri aĉeto aŭ kunluado de domo en Bruselo por Monda Turismo, Esperantista Brusela Grupo, BEF, EEC kaj eventuale BEFA. Ĝi evoluos laŭ oportuneco kaj financaj rimedoj, sed ŝajnas nuntempe malfacile realigebla.

5. LDS raportas pri la agado de BEFA, tiu raporto estas legebla alipaĝe.

6. MD raportas pri ILEI-Belgio, kie montriĝas novaj perspektivoj :
   - nacie per ellaborado de oficialigebla programo por Eo-instruado, laŭ oficialaj normoj kaj skemo de la ministerioj ( projekto gvidata de S-ro Derzelle, Namur )
   - nacie kaj internacie per organizado de la 1986-a Internacia Konferenco de ILEI de la 12-a ĝis la 19-a de julio en Louvain-la-Neuve (informoj ĉe MD )
7. JB raportas pri la evoluo de la jubilea programo en Flandrio. La ĝenerala jarkunveno ricevas informojn pri la decidoj de la matena kunveno de Klubo 100. Pri kroma punkto (ekzamenkomisiono) oni konsentas pri prokrastado ĝis post ellaborado de la programo (punkto 6).
   En pli ĝenerala kunteksto lige kun la Jubileo GM raportas pri la sukceso atingita post multa klopodado rilate al UNESCO-rezolucio favora al Esperanto. Temas laŭ li pri vera triunfo, kondiĉe ke oni utiligu ĝin ĝisfunde.
8. M.De Schepper raportas pri la agado de SONORILO.
9. La ĝenerala jarkunveno aprobas la fondiĝon de komisiono pri turismo en kadro de BEF, kaj la elekton de S-ino Caestecker kiel ĝia gidantino.
10. Estraro : la ĝen. Jarkunveno konfirmas la elekton de S-ro Rabosée kiel helpsekretario, kaj ĝoje ekscias pri la preteco de Roger De Schepper akcepti en ne tro fora estonto la taskon de kasisto de BEF.

Prot/ MD

ALDONAJ RIMARKOJ :

- Adresŝanĝo : ekvalidas jam ekde nun nova adreso de M.Demonty, nome Schoolstraat 3, 1710 Dilbeek, la telefonnumero ankoraŭ ne estas konata.
- Alvoko : inter la jarkunveno de 1984 kaj tiu de 1985, estis kunvokita nenia kunveno en la kadro de BEF aŭ Klubo 100 por tuta Belgio, supozeble pro troa okupiteco de la estraranoj. Tiuj, kiuj opinias ke kunveno estas necesa proponante tagordon, ne hezitu sciigi tion al la prezidanto aŭ la sekretario(j) de BEF.

## KLUBO 100

aranĝos la enlandan "Programon por la Jubileo de Esperanto". Amikoj kaj simpatiantoj kontribuu kaj helpu ĝiajn agadojn ! Unufoja kotizo minimuma 1000 BF rajtigas voĉdonon en ĉiu kunveno de la klubo, kaj ..!! partoprenon al lotumado de senpaga vojaĝo al UKE Varsovio 1987 !! per Monda Turismo. Vi povas sendi la pagojn al bankkonto 034-0379435-33 de KLUBO 100 ! aŭ al konto de BEF, FEL aŭ APE, menciante sur la pagilon "Donaco por KLUBO 100" (BEF mem povos sendi al vi laŭleĝan ateston por rabato je viaj impostoj ) NE HEZITU ! Ekagu nun por ke 1987 vere iĝu la jubilea jaro de Esperanto !! Jam plurdekoj da donacintoj antaŭiris vin. Ni esperas atingi almenaŭ 100 ! Kiuj gesamideanoj volas ke siaj nomoj ne aperu en la liston ? !!!!